Votre revue de l'Association Pour l'Espéranto

N° 1 - 2015

# Espéranto en Marche




## Enhavo

Paĝo 2 : Venonta Ĝenerala Asembleo de BEF : 14/03/2015

Paĝo 3-4-5 : Provizora Protokolo de la pasinta Ĝenerala Asembleo de BEF (22 / 03 / 2014) :

BN : Ĝi ankoraŭ devas esti aprobita dum la venonta ĜA je 14/03/2015.

Paĝo 6 : Verdaj Skoltoj, kiuj ni estas ? Por kiaj agadoj ? Subtenu nin !

Paĝo 7-8 : PEKO 2015 EN MOZET : 8-9-10 de majo 2015.

Paĝo 9-10 : Novaĵoj pri agadoj en Afriko

Paĝo 11 : Lingvoj plej parolataj en la mondo

Paĝo 12 : 100-a UNIVERSALA KONGRESO DE UEA en LILLE : 25/07-1/08/2015. Ne prokrastu vian aliĝilon !

Paĝo 13 : Kalendaro pri eventoj. - Trezoroj de nia biblioteko.

Paĝo 14 : Programo en la Kastelo « Gresillon »

Paĝo 15 : Informoj pri Esperanto en Belgio.

Paĝo 16 : Kotizoj 2015 por APE kaj UEA.

***********************************************

**Editeur responsable: Claude Glady**
**Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE**
**071/64 49 16 cglady@arcadis.be**

# BELGA ESPERANTO FEDERACIO (BEF)


Fédération Belge d'Esperanto
Belgische Espererantofederatie
BELGA ESPERANTO FEDERACIO

Defakta Asocio aliĝinta al UEA
Ĉe la sekretario : Claude Glady
Rue du Culot,1 -
B-5630 CERFONTAINE
0032-(0)71-64491
cglady@arcadis.be


## VENONTA ĜENERALA KUNVENO DE BEF: 14/03/2015

**La Ĝenerala Asembleo de BEF okazos en DILBEEK**
**Sabaton, la 14-an de marto 2014, je 13h30**
**Westrand Kamerijklaan, 46. Salono 302**
**1700 DILBEEK 02/466 20 30**

**TAGORDO :**

1) Enkondukaj vortoj de la prezidantino kaj de la vicprezidanto.
2) Organizado de la Protokolo kaj de la listo de ĉeestantoj.
3) Aprobo de la raporto de la ĜA de BEF (23-an de marto 2014)
4) Financa Raporto.
5) Funkciado de BEF : Arkivoj.
6) Informado pri la agadoj de FEL / APE / EBG / BEFA / ILEI / kaj Aliaj ...
7) Rilatoj kun UEA kaj EEU.
8) Verdaj Skoltoj
9) PEKO 2015
10) Eksteraj agadoj ,.....
11) Internaciaj agadoj.
12) Komitata malŝarĝo.
13) Administrantaro – Kandidatoj – Elektoj.
14) Diversaĵoj.

La Sekretario
Claude GLADY

NB : Bonvolu informi ĉiujn interesatulojn… Dankon !
Ĉiuj samideanoj estos bonvenaj.

Flory : 059-702914 flory2@witdoeckt.be
Marcel : 071-431413 0476/201273 mardelforge@brutele.be
Eric : 02-3848223 ericbaert@skynet.be
Claude : 071-644916 0485/914659 cglady@arcadis.be

# PROTOKOLO DE LA GENERALA ASEMBLEO DE BEF

**Dato : Sabaton, 22-an de marto 2014. Je 13 h 30..**
**Loko : En Amougies (Mont de l'Enclus/Kluisbergen) : Centre Protestant/ Protestantse Centrum. Pavilono 2. Rue Voie Verte, 16. BE-7750 AMOUGIES. Samtempe kun la Printempa Esperanto Kunveno (PEKO).**

**Ĉeestas 11 partoprenantoj : Flory WITDOECKT (BEF), Marcel DELFORGE (BEF), Claude GLADY (BEF), Piet GLORIEUX (FEL), DE BUYL Nicolas (EBG), Dina DELOYER (EBG), Walter VAN DEN KIEBOOM (FEL), Georges SOSSOIS (APE), Clara BRACKE (BEFA), , Valère DOUMONT (APE), DE MEYERE Hubert (APE)**

**Senkulpiĝis : Eric BAERT, Marc CUFFEZ, Jo HAAZEN, Mireille STORMS, Walthère THOLET, Eddy RAATS, Roland ROTSAERT, Francine SPERBER.**

**Prezidas: Flory WITDOECKT (Prezidantino). Marcel DELFORGE (Vicprezidanto). Protokolas : Claude GLADY (Sekretario).**

**BN : Rogier Huurman informas pri Beneluksa Esperanto Junularo. (rogier.huurman@gmail.com).**

**1. Enkondukaj kaj bonvenigaj vortoj de la prezidantino.**
**Fakte, Flory salutas la kuraĝulojn kiuj elektis nian kunvenon, sciante la diversajn agrablajn eblecojn, proponitajn far samtempa kaj samloka PEKO. Tamen, tio postulas al ni problemon : ĉu vere estis bona ideo, organizi nian jarkunvenon samtempe kun alia okazaĵo. Estonte, ŝajnas prefereble ne plu fari tion.Necesos scii kiam PEKO 2015 okazos, kaj tiel elekti alian daton, komence de printempo. Ni povos organizi nian proksiman Ĝeneralan Asembleon en Dilbeek, kiel antaŭe proponita. Ni konsultu s-rojn Buyst kaj Demonty por tio.**
**Flory informas ke Roland ROTSAERT bitigis sur la reto, ĉiujn gravajn dokumentojn de BEF, kiujn ni posedas. Ŝi proponas ke nia Asembleo dankas lin por tio ! Fakte, parto de la paperaj arkivoj de BEF troviĝas ĉe la sekretario, kiu sendis mankantan petatan dokumenton. Marcel aldonas ke estas ankaŭ arkivoj en Kortrijk. Eventuale, la sekretario donu la dokumentojn al Roland por ke li bonorde rigardu.**
**2. La listo de la partoprenantoj cirkulas : 11 subskriboj.**
**3. Aprobo de la protokolo (23/03/2013) : unuanime aprobita.**

**BN : Valère DUMONT deziras saluti nian kunvenon, sed sciigas ke li ne plu povos ĉeesti ĉar li devige devas prizorgi la nunajn eventojn de PEKO.**

**4. Financa raporto far Marcel DELFORGE, ĉar nia kasisto Eric Baert ne povas ĉeesti. Post rapida legado de la financaj dokumentoj, denove aperas la problemo: Kion fari per tiu mono de BEF. Uzi ĝin por pure belgiaj aŭ eŭropaj agadoj ? Dividi ĝin por la tri grupoj. Sed kielmaniere ? Eble belgaj grupoj povus ricevi monhelpon. Sed por kiaj agadoj ? Ni ekzemple devas konstati ke disdoni flugfoliojn ne havas ofte pozitivajn rezultojn. Kelkaj grupoj ricevas malgrandajn subvenciojn, FEL ekzemple ricevas malmulte kaj havas financajn problemojn.**
**Estas malfacile decidi nun ! Ni cerbumu tion ĝis la venonta Ĝenerala Asembleo...**

**5. Funkciado de BEF : Ni jam informis pri la retigo de la arkivoj.**
**Estas demando de Renato Corsetti : li mastrumas la liston "Esperanto en Belgujo". Li preferus ke iu belgo reprenus la mastrumadon de tiu listo. Fakte, ni ne bone vidas la utilon de tiu listo, ĉar jam ekzistas aliaj listoj kiuj rilatiĝas al la samaj aferoj. Piet Glorieux proponas ke li persone respondu al li.**

**. Grupaj agadoj:**
**FEL : Piet Glorieux reprezentas la estraron de FEL, kiu bedaŭrinde ne povas ĉeesti. Li substrekas ke la financa situacio ne pliboniĝis. La konstruaĵo de la Verda Stelo devos esti vendata. La Grafika Centro funkcios ĝis kiam la presisto emeritiĝos. La aparataro estas malnova kaj riparoj estas necesaj.**

**FEL havas novan prezidanton (Jo Haazen) kaj Marc Cuffez estas la sekretario. Niaj revuoj "Horizontaal" kaj "Vertikale" regule aperas. La revuoj havas novan ĉefredaktoron.**
**Grava afero : FEL decidis organizi Postkongreson en Belgio, post la 100-a UK en Lille en 2015. Ni bezonos helpon de EBG kaj APE por tio. Ĝi okazos parte en Loveno (Leuven kaj L-L-N) kaj parte en Kortrijk.**
**Ni devas trovi fluparolantajn esperantistojn por gvidi eksterlandanojn.**
**Flory rimarkigas ke okazos ankaŭ Antaŭkongreso en Francio..**

**APE: Hubert informas pri la rezultoj de la letera demandaro pri la eldonado de nia revuo EeM. Ni ricevis 63 % da respondoj, kun 91% ege bonaj kaj 8,1% tute bonaj. Sed ekzistis kritikoj ĉar ne ĉiuj konsentas kun la celo de la revuo. Li resumas tiel : estas vango frapo por mi sed sen konsisto. Nun la revuo havas novan redaktorinon (Jeanne Draime) kiu uzas novan ilon por fari la revuon. Sed estos problemo por eldoni la revuon en 2015, ĉar S-ino Draine konsentis redakti nur ĝis fino de 2014 kaj neniu nova skipo kandidatiĝas.**

**EBG : Nikolao konfirmas ke la grupo pluvivas sufiĉe bone, kun kursoj kaj prelegoj. Okazis Esperanto-kafejoj. Bona novaĵo : ni denove organizos en Bruselo EBG-Zamenhof-Feston. Ni havas problemon kun nia kunvenejo, ĉar necesas esti sur listo por rajti alveni al la kunvenejo. Ni ŝerĉas novan eblecon. Lokon kun ŝranko facile alireblan, ĉar nia biblioteko relative bone funkcias. Nia kotizo ne ŝanĝiĝis, sed la revuo "Aktuala" aperas nun rete, krom se oni pagas suplementon.**

**BEFA : Clara senkulpigas Lucien De Sutter, kaj diras ke ni havas samajn problemojn por la loko, ĉar ne plu estas sufiĉe da fervojistoj en la grupo. Ĝis nun ni ĝuis senpagan okupon, sed ni ne havas garantion por la estonto.**

**ILEI : Flory informas ke, venontan monaton, Radovan Petrovic venos en Ostendo, kie estas bela nova junulargastejo, por diskuti pri la situacio de ILEI. Ekzistas ebleco por ricevi monhelpon de la komunumo.**

**7. Rilatoj kun UEA :**
**- UEA nur rekonas BEF, kaj Flory estas nia A-Komitatano. Marcel ne plu estis reelektita kiel Komitatano-C, sed proponas resti kiel observanto.**
**Unuanime akceptita.**
**Necesas sendi leteron al UEA por proponi tion.**

7. Rilatoj kun UEA :

- UEA nur rekonas BEF, kaj Flory estas nia A-Komitatano. Marcel ne plu estis reelektita kiel Komitatano-C, sed proponas resti kiel observanto. Unuanime akceptita. Necesas sendi leteron al UEA por proponi tion.

Rilatoj kun EEU :

- Flory prezentas faldfoliojn kiuj estis vaste disdonitaj. Sukcesa agado de tre alta nivelo. Sed estas programo de ĉ. 45000 €, kaj ni denove bezonas monon ĉar FEL devas pagi la trionon. Estas projekto por interrelatigi kaj tuŝi la eŭropanojn pere de Esperanto. Ĝi ankaŭ estos farita en la angla.
Ni esperas konkludi tiun projekton por la fino de tiu-ĉi jaro.

- Ekzistas filmo pri la Eŭropa Himno. Aperas 40 kantistoj, inter ili, 3 esperantistoj. Vi povas viziti la retpaĝon : "www.lingvo.info".

- Ekzistas peto por fari peticion por la Himno en Esperanto. La respondo estas ke esperanto ne estas eŭropa lingvo sed tio ne estas nia celo. Por subteni nian peton, ni ŝatus ricevi belajn bildojn de valonio por 20 sekundoj da filmo. Atentu ke ekzistas problemo pri kopirajtoj por publike foti monumentojn. Estas urĝe !

- Iu belgo devus reprezenti Belgion en EEU ! Kiu? Ĉar Flory jam fariĝis vicprezidantino de EEU ?! Li/ŝi evidente devos iri al la Kongreso de EEU. Oni proponas Walter Van den Kieboom.. Unuanime akceptita !

- La problemo de la kotizo al EEU pludaŭras ! Ekde nun, FEL pagis la kotizon por siaj ĉ. 270 membroj. Estas nova jaro, kaj do, denove, ankaŭ APE kaj EBG devas pagi, kalkulante la propran membraron.

8. Eksteraj agadoj :

- Heidi Goes petis helpon por sia agado en Indonezio. BEF povus sendi monon al ŝia UEA-konto. Oni proponas 400 € ! La propono estas akceptita... Samtempe, ni konsentas denove doni 200 € al BEFA por subteni iliajn kursojn. Propono ankaŭ akceptita. La kasisto ĝiros do tiujn du sumojn.
- Flory konfirmas ke la Konga agado pludaŭras.

9. Internaciaj agadoj : Estis peto de Flory, sed ŝi diras ke ni jam parolis aliloke pri tiuj agadoj.

10. Komitata malŝarĝo : Unuanima akceptita.

11. Kandidatoj ? La nuna administrantaro pluestas

12. Diversaĵoj.

- Internacia peticio de Thierry Saladin, kuracisto en Montpellier.
"www.agoravox.fr/auteur/thierry-saladin"
- Demando por la Monda Foiro dum la UK far Anna Löwenstein. Estas afero por EEU.
- Eddy Raats deziras informi pri la eldonaĵoj de MAS (104 ekzemplerojn). Instigo por aĉeti la librojn.

Venonta Ĝenerala Asembleo de BEF : Verŝajne en Dilbeek.
Ni devos decidi pri la dato ! (NDLE : Ĝi okazos do la 14-an de marto 2015 !).

La Sekretario
Claude Glady

# VERDAJ SKOLTOJ



**Les Verdaj Skoltoj proposent un scoutisme international en Espéranto. Les participants ont entre 11 et 17 ans. Ils viennent de Bruxelles, de Flandre, de Wallonie, de France, du Luxembourg et d'Allemagne. Et parfois de plus loin !**

**L'Espéranto est notre seule langue commune !**
**Nous avons tous appris cette langue super rapide à apprendre.**
**Ainsi nous pouvons communiquer sur un pied d'égalité.**
**Quand chacun fait un pas vers l'autre, c'est plus sympa, non ?**

***Que faisons-nous ?***

**Nous nous réunissons environ 7 week-ends par an et organisons un camp d'une semaine en été. Tout le monde est bienvenu. Comme tout les groupes scouts : nous apprenons l'autonomie (cuisiner, camper, s'orienter, faire du feu...), nous jouons, nous chantons (parfois), nous bavardons, nous faisons des ateliers (woodcraft, cuisine sauvage) et nous vivons un maximum d'aventures !**
**Durant nos week-ends nous essayons de rencontrer les scouts locaux. Et nous leur parlons de l'Espéranto.**

**Le projet a démarré en novembre 2012. Depuis nous avons organisé plus de 15 week-ends et deux camps d'été.**
**Durant le camp d'été de 2014, nous avons eu la chance d'accueillir Marti de Barcelone, et Romain et Samuel de Suisse.**

***Quels sont nos prochaines activités ?***

- **un week-end en février, les 20, 21 et 22 février.**
- **un week-end en mars**
- **une semaine sur la Semois à Pâques**
- **nous organiserons PEKO, les 8, 9 et 10 mai**
- **pas de camp d'été cette année, nous participerons tous à IJK.**

**Plus d'info sur notre site internet !**
**https://verdajskoltoj.wordpress.com**

**Une ASBL « VERDAJ SKOLTOJ » vient d'être fondée pour permettre une organisation efficace et permanente de ce groupe de jeunes.**
**Vous pouvez la soutenir financièrement en versant à son compte :**
**BE25 9731 2584 2982 des Verdaj Skoltoj Asbl,**
**Ruelle de Thuin 20 à BE-6540 LOBBES**

 

# PEKO 2015 Aliĝu, venu, ĝuu !

## Printempa Esperanto-Kunveno

08—09—10 majo 2015    Domaine de Mozet,    Valonio

## Por kiuj? Por Vi! 

**Nia kunveno celas ĉiun:**

**infanoj junuloj, plenkreskuloj, komencantoj, fluparolantoj…**

**Ĉi jare la loko estas bonega por la junaj infanoj : ena korto, herbejo kun etaj bestoj, parko ĉirkaŭ la kastelo. Pasintjare, la Verdaj Skoltoj helpis dum PEKO. Ĉi jare, ili organizas ĝin! Atentu, *ne eraru kiam vi ĝiros vian kotizon…***

## Programo

**Okazos esperanto-kursoj kun pluraj niveloj. Sed ne nur! Ni ankaŭ proponos al vi kulturan programeron, promenadojn, ekskursojn, prelegojn, manlaboradon por infanoj, libroservon… Kiel vi vidas ni ambicias ampleksan kaj mojosan programon. Multaj reklamis pli da manfarado, mi jam povas anonci ke vi povos fari vian propran bieron dum PEKO!**

**Jen skiza programo (pli da informoj alvenos).**

**VENDREDON LA 08AN DE MAJO**

**Akceptejo ekde la 17a30**
**Vespermanĝo je la 18a30**
**Interkona vespero, prelego, filmo**

**SABATON LA 09AN DE MAJO**

**Prelegoj, kursoj, manfarado, promenado kaj bierfarado!**

**DIMANCHE 10 MAI**

**Prelegoj, kursoj, ktp matene. Ekskurso posttagmeze.**

## Kie ? 

**Domaine de Mozet 2, rue du Tronquoy 5340 Mozet**

**Ni kunvenos en la “Domaine de Mozet“. Tiu malnova bieno-kastelo iĝis la trejn-centro de la belgaj katolikaj skoltinoj. Mozet estas unu el la plej belaj vilaĝoj de Valonio. Ĝi estas 12km for de Namuro. La plej proksima stacidomo estas Namuro.**

**Ni helpos vin atingi la ejon! Ni organizos taksi-servon ekde la stacidomo de Namuro.**

## Ĉambroj 

**La kastelo havas multaj ĉambroj. Bedaŭrinde ni disponos nur 5 unulitajn ĉambrojn kaj 2 dulitajn ĉambrojn. La aliaj ĉambroj havas inter 4 ĝis 6 litoj. Plej ofte kun lavujo. Duŝejoj kaj necesejoj estas trans la koridoro.**

**Ni disponos ankaŭ unu amasloĝejo de 15 litoj.**

**Ankaŭ eblus tendumi (kun via propra tendo) ĵus apud la kastelo.**

# Kotizoj por PEKO 2015

**La kotizo inkluzivas preskaŭ ĉion: la manĝojn, la tranoktadojn, la programon, la spektaklojn, la aĵojn por la manfarado, la ekskursojn.**
**Kaj ankaŭ akvo, kafo kaj teo. La aliaj trinkaĵoj estas pagendaj.**

***POR PLENTEMPA PARTOPRENADO***

| aliĝo ĝis la | 22an de februaro | 01an de aprilo | poste au surloke |
|---|---|---|---|
| bebo | senpaga | | |
| ĝis 18 jaroj | 50€ | | |
| ĝis 25 jaroj | 75€ | 100€ | 125€ |
| ekde 25 jaroj | 99€ | 125€ | 150€ |

**BN : aĝo en la komenco de la kunveno**
- **aldono por dulita ĉambro: 30 € por persono**
- **aldono por unulita ĉambro : 75 €**
- **krompago por la littukoj : 6,5 €**
- **rabato por la tendumistoj : 10 €**
- **rabato por la kontribuanto laŭ interkonsento**
- **rabato por familio (ekde 3 infanoj): 50€ por familianoj**

***POR PARTA PARTOPRENADO***

| | |
|---|---|
| Vendredon – vespermanĝo kaj programo (sen tranokto) | 35€ |
| Sabaton – tagmanĝo, vespermanĝo kaj programo | 50€ |
| Dimanĉon – tagmanĝo, programo kaj ekskurso | 50€ |
| Tranoktado kun matenmanĝo sen littukoj | 40€ |

**ALIAJ DEMANDOJ?**

**Kontaktu Valère por interkonsenti ! La aliĝo validas nur post nia konfirmo.**

# Aliĝilo por PEKO 2015

**Sekvu la suban ligilon au klaku sur la bildo por malfermi la aliĝilon.**

**http://goo.gl/forms/h8yvn3UBHr**

**Vi ankaŭ povas aliĝi per telefono aŭ retmesaĝo.**

**doumontvalere@yahoo.fr +32 71 165 395 +32 485 517 552**

**LA KOTIZOJ ESTAS PAGENDAJ :**

**- JE LA BANKKONTO DE LA VERDAJ SKOLTOJ:**

**BE25 9731 2584 2982 BIC : ARSPBE22**
**Verdaj Skoltoj ruelle de Thuin 20**
**BE 6540 Lobbes Belgique**

**- AU ĈE FEL: VSKO-N**

# NOVAĴOJ PRI AGADOJ EN AFRIKO

**Karaj geamikoj,**

**Jen finiĝas la jaro 2014 kaj la nova jam frue komenciĝos. Niaj diversaj laboroj por Esperanto estu nun traskribritaj, ke ni distingu kion daurigi kaj kion ne, kaj kion novan enkonduki. Se konsideri, ke la afrika agado komenciĝis en 1980, kiam Hans BAKKER ekzorgis pri ĝi, oni pravas fieri, ke afrikaj Esperantistoj estas maturaj/spertaj pri la verda mondo, ĉar jam pli ol 34 jarojn ili vivas kun Esperanto. Do, multon ili kapablas fari tute serioze, honeste kaj bonkore, kiel Hans instruadis kaj plu pluinstruetis al afrikaj esperantistoj. Sed ĉu ĉio okazis tiel ?**

**Tra la jaroj on vidis la funkciadon de la kluboj kaj asocioj en Afriko. Preskaŭ ĉiuj nomas sin ne pagipovaj. Kiuj en 1980 estis lernejanoj kaj eklernis Esperanton, ĉu tiuj, nun en 2014, post jam pli ol 34 jaroj ne demetis sian lernejan veston ? Se tiam ili estis nepagipovaj, ĉu nun ili ne estas almenau pagipovetaj ? Oni fiere aŭdis pri 5-a Afrika Kongreso en Benino, kaj nun pri AMO-7 en Togolando. La demando estus:"Ĉu afrikanoj mem tion organizis per propraj rimedoj ?" Kiu donas  monon por tiaj aferoj, tiu havas ĉiam siajn postulojn.**

**Al tiuj ĉi aldoniĝas postuloj de afrikanoj mem, kiuj iel rilatas al la mondonantoj. Tiuj ĉi scias nenion kaj devis seniluziiĝi post la okazigo de la evento. Kiuj povas kulpi en tio ? Nek la mondonanto, nek la afrikaj kunlalborantoj de la mondonantoj, sed la naturo, kiu rifuzas al afrikaj esperantistoj kreski. Renato CORSETTI tute prave diradas, ke afrikaj esperantistoj estas junuloj, kiuj bezonas piedpilkon. Simila rimarko venis de Jano PETIK, kiu diras, ke ĝis nun la afrika movado estas en bebeaj ŝuoj. Ambaŭ homoj pravas, ĉar se post intensaj laboroj de Hans Bakker ĝis 2000 kaj poste, afrikaj esperantistoj plumontras sian infanecaĵon al la tuta mondo, la movado afrika neniom progresos. Oni rimarkos nur ŝajnajn movojn, kiuj fakte maskas problemegojn en la movado afrika. Antaŭ la 5-a afrika kongreso kun 32 partoprenantoj en Benino, okazis Esperanto-Konferenco en 2008. Kion tiuj eventoj postlasis ? Nefordesindas la dua afrika kongreso en 1991 en la sama lando kaj la sekvoj. Certe AMO-7 iros ne alian vojon.Ni vidos. Kresku, Afrikaj esperantistoj, kresku ?**

**Asocio tute ne estu la proprieto de la iniciatinto. Tio estas infanaĵo, kiu neniel progresigos la asocion. Eble dumviva regado estas en la sango de afrikanoj. Prezidantoj preskaŭ dumvivaj de Esperanto-asocioj ne mankas en Afriko. Nun ne estas la momento citi Beninon kaj Burundion, ĉar certe la prezidantoj de la E-asocioj en tiuj landoj jam pripensas la aferon. Kaj en la afrika komisiono mem io tia ŝajnas funkcii. Togolando volas esti la ekzemplo de prezidantoj kun maksimume du mandatoj dujaraj. Tamen alia plago aperis tie dum la mandato 2012-2014:la asocio estis kvazaŭ propraĵo de unu estrarano, kiu faras el ĝi kion li volas. Tio ne povos daŭri, kaj nun funkcias alia estraro, kiu konas sian defion. Afrikaj esperantistoj kreskas.**

**Esperantistoj togolandaj rekonas sian esperantistecon multjara, kaj tial jarojn proponadas, ke la E-asocio en Togolando havu siajn membrojn. Ne sufiĉas esti esperantisto en iu lando por nomi sin membro de la E-asocio. Oni devas aliĝi, kaj per tiu aliĝo havi siajn rajtojn kaj devojn. Komitatkunsidoj de UTE (Unuigho Togolanda por Esperanto) de la 8a de novembro kaj 6a de decembro 2014 emfazas tion. La asocion faras la membroj. Tion afrikaj esperantistoj scias ne en la esperanto-movado, sed ekster ĝi. Esperantistoj estas membroj de ne-esperantaj asocioj kaj tie kotizas regule ĉiumonate. Kial ili ne tion faras por la Esperanto-asocioj/kluboj ? Feliĉe io jam komencetas okazeti en iuj landoj afrikaj, kie esperantistoj financas grandan parton de sia agado. Grandan rolon ludu en tio la Esperantistoj, kiuj ne havas bebeajn ŝuojn. Ili ja abundas en Afriko. Kion ili faru ?**

**En Afriko, antaŭuloj ofte havas la ŝarĝon zorgi pri la posteuloj. Hazarde la instruo de Hans estis en la sama linio. Do, Esperantistoj, kiuj lernis de Hans, devas nun zorgi pri aliaj afrikanoj, farante al tiuj ĉi, tion, kion Hans faris al ili. Eble venus la demando Hans faradis al siaj gelernantoj afrikaj. Ne necesas diri tion, char ĉiuj scias la manieron laŭ kiu Hans prizorgadis kaj nun pluprizorgas afrikanojn. Tiuj ĉi devas daŭrigi la laborojn de Hans, kiuj nun pluiras en Afrika Centro Esperantista (ACE). Ne nur afrikaj esperantistoj faru tion, sed ankaŭ ĉiuj esperantistoj kiuj tra la mondo aprezas la laborojn de Hans. Eble necesas organizi tiujn laborojn. ACE, kiun Hans kaj togolandaj esperantistoj iniciatis, kunordigos la laborojn kaj tial nun proponas starigon de Amikaro de Hans BAKKER. Tiu ĉi amikaro eternigos la laborojn de Hans farante ilin nun kaj pretigas la grundon por transdoni la laborojn al la posteularoj. Tio ĉi estas maniero danki al Hans BAKKER jam nun pro ties granda laboro por Afriko. ACE jam komencis la laborojn en 2006 kaj daŭrigos ilin. ACE pluhelpos esperantistojn, precipe afrikajn :doni subvencietojn al kluboj, disponigi diversajn kursojn kun ekzamenoj, pretigi periodaĵojn, eldonigi verkojn, starigi retpaĝarojn ktp. Por tio, ĝi kunlaboros kun diversaj organizaĵoj samcelaj.**

**Estimataj geamikoj,**

**Ni vidas, ke nia sorto estas en niaj manoj, kion ĉiuj scias. Necesas nur rekoni tion kaj agi tiucele. Certe la afrika agado en 2015 sub la kupolo de ACE estos pli videbla ol en la pasintaj jaroj. Ĝi plu utilos al UETA (Unuiĝo de Esperantistoj en la Tuta Afriko) kiel ties sidejo,kaj ege helpos al UETA realigi sian programon de 2015. Ĝia plano, kiu baldaŭ aperos, malkovrigos tion. Ĉiuj esperantistoj estas petataj aliĝi al la ideo pri starigo de Amikaro de Hans BAKKER kun la celo daŭrigi la laborojn instruajn kaj humanajn de Hans en Afriko.**

**Certe tio povos kontribui al pliaktivigo de la ĝenerala E-movado nun iel stagnanta videble tra retlistoj dormantaj.**

**Por Afrika Centro Esperantista**

**Legu pli pri afrikaj agadoj en la revuo « ESPERANTO EN AFRIKO » N° 24 (1-2015) :**

**http://www.esperanto-afriko.org/Esp%20en%20Afriko%2024a%20nro.pdf**

# LA PLEJ PAROLATAJ LINGVOJ EN LA MONDO

**Laŭ la internacia entrepreno "Worldwide Translation Services Ltd" <http://www.wwt-services.co.uk/>, estas la jena stato pri la plej parolataj lingvoj laŭ tri subaj kriterioj:**

**1. *Laŭ la gepatra lingvo*:**

**845 milionoj - la ĉinmandarena**
**329 milionoj - la hispana**
**328 milionoj - la angla**
**240 milionoj - la hindua**
**232 milionoj - la araba**

**2. *Laŭ la nombro de parolantoj kiuj uzas la lingvon malsaman ol la gepatra:***

**la angla kaj la ĉinmandarena (mil milionoj ambaŭ)**
**la hindua,**
**la hispana,**
**la rusa**

**3. *Laŭ la uzo en la reto:***

**27% - la angla**
**22% - la ĉinmandarena**
**7% -la hispana**
**5% - la japana**
**4% - la portugala**

**Fonto : J-K Rinaldo el Padova « Eŭropa Bulteno » decembro 2014**
**http://www.europo.eu/euhropa-bulteno**

## Eventoj al la Marcinella-Kurso en februaro, marto, aprilo 2015

| | | |
|---|---|---|
| 03/02 | Alain Ancion | Bonaj alimentoj por la sano, kontraŭ la kancero. |
| 10/02 | Marcel Delforge | La bienoj kiuj pluekzistas post la batalo de Water |
| 17/02 | ////// | Karnavalferio—Congé de Carnaval |
| 24/02 | | Gramatikaj ekzercoj |
| 03/03 | Jeanne Draime | La loĝantoj de mia pluretaĝg domego |
| 10/03 | | Neniu kurso |
| 17/03 | Jean Koos | La birdo nomita « komuna pasero ». |
| 24/03 | JP Sparenberg | La temo estos surprizo ! |
| 31/03 | | Gramatikaj ekzercoj - Exercices gramaticaux. |
| 07/04 | Mireille Marnette | Ilustritaj esperantistaj fabeloj |
| 14/04 | Edith Desmette | Conte chinois |
| 21/04 | Marcel Delforge | Historio de la urbo Karloreĝo. |
| 28/04 | | Gramatikaj ekzercoj - Exercices gramaticaux. |

**http://esperanto-wallonie.be/fr/cours-marcinelle-marcinela-kurso**

# Lillo gastigos la 100-an UK 2015

**La nordfranca urbo Lillo (Lille) gastigos la 100-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2015. La Estraro de UEA decidis pri la loko de la jubilea UK en la lasta tago de sia kunveno, kiu okazis de la 22-a ĝis la 24-a de marto en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Inviton pri la okazigo de la 100-a UK en Lillo faris Unuiĝo Franca por Esperanto.**

**Universala Kongreso de Esperanto estas unu el la plej longedaŭraj kongresaj tradicioj en la mondo. Kvankam tiu tradicio komenciĝis en 1905 kaj do estos jam 110-jara en 2015, la jubilea UK en Lillo portos la numeron 100, ĉar dum la Unua kaj Dua Mondmilitoj UK ne povis okazi. La 100-an datrevenon de la unua UK oni festis per la 90-a UK en la litova ĉefurbo Vilno en 2005.**

**KONGRES-KOTIZOJ VALIDAJ**
**(En €)  [Por Belgio : Kategorio A !]**

| | ĝis 2014.12.31<br>1-a periodo | ĝis 2015.03.31<br>2-a periodo | ekde 2015.04.01<br>3-a periodo |
|---|---|---|---|
| Aliĝkategorio | A | A | A |
| 1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG) | 180 | 225 | 270 |
| 2. ne individua membro de UEA | 225 | 280 | 340 |
| 3. komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA | 90 | 115 | 135 |
| 4. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA | 135 | 170 | 205 |

**Je la 1/02/2015 : aliĝis jam 1813 personoj el 88 landoj. Kies 80 el Belgio.**

**Se vi interesiĝas por partopreni, petu al la peranto (071/644916) la flavan aliĝilon !**
**Vi povas pagi rekte al UEA, al FEL, aŭ al la konto de la peranto por franclingva Belgio.**
**BN : Vi povas fariĝi « individua membro de UEA » pagante nur la MJ-Kotizo de 26 €.**
**(Vidu la adreson kaj la kontonumeron de la peranto al la paĝo 16 de tiu-ĉi bulteno).**

## CALENDRIER POUR 2015 (PROVISOIRE)
## ESPERANTO-EVENTOJ EN 2015

**Pli kompleta kalendaro en : http://www.eventoj.hu/2015.htm**

**20-22/02 : Semajnfino de la Verdaj Skoltoj.**

**8-15/03 : Mediteranea Esperanto-Semajno, MES-2015 - en restadejo Val d' Esquiere - Les Issambres ĉe la Lazura Marbordo, Francio.**

**13-15/03 : Intensa Esperanto-kurso - en Herzberg am Harz - Germanio.**

**14/03 : ĜENERALA ASEMBLEO DE BEF en DILBEEK. Vidu pĝ 2 !**

**1-7/04 : Internacia Junulara Festivalo (IJF) - Brusson, Aosta Valo, Italio**

**3-10/04: Printempa Semajno Internacia - en Winterberg, Germanio.**

**08-10/05 : PEKO 2015 au domaine de MOZET. Vidu pĝ 7 !**

**22-25/05 : 92a Germana Esperanto-Kongreso - en Hameln, Germanio.**

**3-7/04 : 70-a SAT-AMIKARA KONGRESO en VERDUN**

**17-25/07 : 48a Konferenco de ILEI - en Oostende, Belgio.**

**20-25/07 : Antaŭkongresa ekskurso - en Baugé, Francio.**

**25/07-1/08 : 100-a UNIVERSALA KONGRESO DE UEA en LILLE**

**1-5/08 : UK-Postkongreso en Flandrio/Bruselo - en Flandrio - Bruselo,**

**2-9/08 : Internacia Junulara Kongreso, IJK - en Wiesbaden, Germanio.**

**8-15/08 : 88-a KONGRESO de SAT : En Nitro (Slovakio)**

**22-29/08 : 82-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO en San BENEDETTO del TRONTO**

## TREZOROJ DE LA BIBLIOTEKO DE APE

**En nia biblioteko, vi povas trovi kelkajn interesajn maloftaĵojn ! Tiuj libroj kaj revuoj estas konsulteblaj ĉe la bibliotekisto en Cerfontaine.**

- **Ni posedas preskaŭ kompletan kolekton de la revuo « LITERATURA MONDO » [Budapeŝto] dum la periodo 1929-1949.**
- **« Universala Esperanto-Metodo » de Doktoro Benson (1932 USA); Por 41 lingvoj kun 11000 bidoj : Benson school of Esperanto**
- **Originala libro de Aisberg : « Fine mi komprenas la radion » (1927)**
- **« RUBAIYAT OF OMAR KHAYAM » en 30 lingvoj, kies Esperanto. [Teherano, Irano 1987].. Kun belegaj koloraj miniaturaĵoj.**

**Se ankaŭ vi, posedas interesan maloftan verkon, kaj se vi ne plu deziras konservi ĝin aŭ timas pro estonta malapero, vi povas donaci tiun trezoron al nia zorgema bibliotekisto. Kontaktu lin je 071/644916 (Tel/resp) !**

# PROGRAMO DE LA KASTELO « GRESILLON » EN 2015

**03-08/04:** Renkontiĝo de *Interkant'* kaj kunkantado kun *La Kompanoj*
**17-25/04 :** PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut -
**25-26/04:** PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1) -
**20-25/07 :** Â ReÄ�aj ekskursoj, UK-antaŭ-kongreso -
**01-08/08:** Lingva semajno, Lingvofestivaleto, tuj post UK -
**08-16/08:** Festa Semajno por infanoj kaj familioj -
**Oktobro:** AŬTUNE, lingva seminario kun Christian Rivière k.a.

**Jara agendo/kalendaro en gresillon.org/agendo <http://gresillon.org/agendo>**

**Por la aŭgustaj semajnoj aŭ- poste, ni bonvenigas viajn proponojn por instrui vian lingvon aŭ Esperanton, por prelegi/koferenci aŭ- por animi aktivaĵojn por infanoj.**

**Skribu al bertox@free.fr**




**ADRESO :**
**Maison Culturelle de l'Espéranto**
**EsperantoKulturDomo**
**Château de Grésillon**
**St. Martin d'Arcé**
**FR-49150 BAUGÉ-EN-ANJOU**
**France +33-241 89 10 34**





# INFORMOJ PRI ESPERANTO

## BELGA ESPERANTO FEDERACIO (BEF)

**Prezidantino :** S-ino Flory WITDOECKT (Oostende) 059 702 914 flory2@witdoeckt.be

## ASOCIO POR ESPERANTO (APE)

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| **Honora Prezidanto :** | Marcel DELFORGE | (Marcinelle) | 071 431 413 | mardelforge@brutele.be |
| **Prezidanto :** | Georges SOSSOIS | (Marcinelle) | 071 436 205 | georges.sossois@gmail.com |
| **Sekretariino :** | Bernadette PONCELET | (Plombières) | 087 398 570 | bernadetteponcelet@skynet.be |
| **Kasisto :** | Claude GLADY | (Cerfontaine) | 071 644 913 | cglady@arcadis.be |
| **Eventoj :** | Valère DOUMONT | (Sambreville) | 0485 517 552 | doumontvalere@yahoo.fr |
| **Promocio Eo :** | Hubert DEMEYERE | (Bouffioulx) | 071 502 691 | hubert.demeyere@gmail.com |
| **Interreto :** | Patrice VAN DE VELDE | (Hamme-Mille) | 0478 251 419 | patrice.vdvelde@gmx.com |
| **Disvastigado :** | Guy BASYN | (Chaumont Gistoux) | 010 688 282 | guy.basyn@skynet.be |

### CHARLEROI : KARLOREĜA GRUPO ESPERANTISTA (K.G.E)

| | | | |
|---|---|---|---|
| Rudy COGNIAUX | (Châtelet) | 0492 710 974 | rudycogniaux@swing.be |
| Mireille MARNETTE | (Marcinelle) | 071 324 733 | marnette.mireille@skynet.be |

### LIEGE-ESPERANTO asbl

| | | | |
|---|---|---|---|
| Denise MAILLET | (Embourg) | 04 365 15 23 | denise.dupont@skynet.be |

### LOUVAIN-LA-NEUVE : « KVINFOLIO » asbl

| | | | |
|---|---|---|---|
| André DEMARQUE | (Wavre) | 0486 516 085 | ademarque@skynet.be |

### VIRTON : GAUME ESPERANTO

| | | |
|---|---|---|
| Gaby SIMEON | (Saint-Mard) | 063 571 204 |

### SENLIME + VERVIERS (V.E.G)

| | | | |
|---|---|---|---|
| Jean-Marie JACQUES | (Verviers) | 087 330 292 | jacques@senlime.org |
| Jose JACOB | (Polleur) | 087 221 079 | |

### KELMIS (LA CALAMINE) : « AMIKEJO »

| | | |
|---|---|---|
| Mathieu SCHRYMECKER | (La Calamine) | 087 853 389 |

### AUTRES VILLES WALLONNES

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| **NAMUR** | René PAIROUX | (Malonne) | 081 460 594 | rene.pairoux@scarlet.be |
| **ATH** | Monique VAN ROY | (Ellezelles) | 068 542728 | |
| **GEMBLOUX** | José VINCK | (Gembloux) | 081 613 016 | |
| **MONS** | Edith COLAS | (Saint-Symphorien) | 065 313263 | |
| **BINCHE** | Maxime LECHIEN | (Vellereille) | 064 337 826 | |
| **DINANT** | Maurice WOUTERS | (Onhaye) | 082 644 635 | eo.wm.5520@skynet.be |
| **COMINES** | J-C THUMERELLE | (Warneton) | 056 557 606 | jcthum@gmail.com |

## KOMUNIKADO asbl

| | | | |
|---|---|---|---|
| Denis FLOCHON | (Namur) | 081 743 853 | info@komunikado.be |

## GROUPE DES CHEMINOTS : FERVOJISTOJ

| | | |
|---|---|---|
| Lucien DE SUTTER | (BXL-Central) | 058 501 825 |

Cours : 1er et 3ème mercredi, chaque mois de 13h30 à 16h

## BRUSELO : ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO (EBG) asbl/vzw

| | | | |
|---|---|---|---|
| Françoise PELLEGRIN | (Rhode-St-Gebèse) | 02 358 27 28 | fransuaz@esperantobruselo.org |
| Nikolao de BUYL | (Koekelbergh) | 0478 382 981 | nikolao@esperantobruselo.org |

## FLANDRIO : FLANDRA ESPERANTO LIGO (FEL) vzw

| | | | |
|---|---|---|---|
| Frankrijklei 140 | (2000 Antwerpen) | 03 234 34 00 | info@fel.esperanto.be |

## VERDAJ SKOLTOJ asbl. [https://verdajskoltoj.wordpress.com]

| | | | |
|---|---|---|---|
| Jean-Pol SPARENBERG | Prezidanto | 0475/27 23 19 | jpsparenberg@gmail.com |
| Valère DOUMONT | Sekretario | 0485/51 75 52 | doumontvalere@yahoo.fr |

## INTERNACIAJ ORGANIZAĴOJ - ORGANISATIONS INTERNATIONALES

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| **UEA :** | Nieuwe Binnenweg 176 | NL-ROTTERDAM | +31 10 436 1044 | www.uea.org |
| **SAT :** | Av. Gambetta, 67 | FR-75020 PARIS | +33 9 50 71 01 97 | www.satesperanto.org |
| **SAT-AMIKARO :** | Bd Vincent Auriol, 132 | FR-75013 PARIS | +33 9 53 50 99 58 | www.esperanto-sat.info/ |

Ĉiuj informoj en Belgio ĉe Claude GLADY : rue du CULOT, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916 cglady@arcadis.be

## ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO (A.P.E.)

### COTISATIONS POUR APE EN 2015

- **MEM : Pour être membre de APE : 10 €**
- **BUL : Pour recevoir les bulletins d'informations : 7 €**
- **FAM : Membre supplémentaire de la famille : 3 €**

**VIREMENT AU COMPTE IBAN : BE72 000 3258537 16 BIC: BPOTBEB1**
**de l'Association pour l'Espéranto (APE).**
**NB: Indiquer les raisons du versement. Exemple : MEM+BUL+2xFAM : 23 €**

## ABONNEMENT A LA REVUE « ESPERANTO-INFO » : 20 €

**Vous pouvez payer directement au compte d'« ESPERANTO-INFO » (conseillé !)**
**Virement européen au compte IBAN: FR91 2004 1010 0811 9014 6B02 947**
**Indiquer : « NOM PRENOM pour Esperanto-Info adresse »**
**Vous pouvez aussi passer par le compte d'APE avec la mention « EoInfo »**

| Kodo | Universala Esperanto Asocio: UEA | | Ricevas |
|---|---|---|---|
| SA | Abono al la revuo "ESPERANTO" de UEA. | 41 € | Revuon "ESPERANTO" sen membreco ! |
| Kto | Abono al "KONTAKTO". | 25 € | Revuon "KONTAKTO" |
| MJ | Membro UEA + "Jarlibro" | 26 € | "JARLIBRON" |
| MJ-T | Membro kun Jarlibro ĝis 29 jaro inkl. | 26 € | Revuon "KONTAKTO" kaj "JARLIBRO" |
| MA | Membro Abonanto (MJ + SA) | 64 € | Revuon "ESPERANTO" kaj "JARLIBRO" |
| MA-T | Membro Abonanto ĝis 29 jaro inkl. | 64 € | Kiel MA plus "KONTAKTO" |
| MG | Membro UEA+"Gvidlibro" | 11 € | "GVIDLIBRO" |
| PT | Patrono de TEJO | 78 € | la revuon "KONTAKTO" subteno al TEJO sen membreco |
| SZ | Societo Zamenhof | 128 € | Mecenata subteno sen membreco. 12 |
| DM | Dumviva membro de UEA (25xMA) | 1.600 € | Dumviva MA |

**Bonvolu pagi al la konto de la peranto por UEA-kotizoj en franclingva Belgio :**

**BE50 750-6373051-18**

je la nomo de :
GLADY Claude Rue du Culot, 1
B-5630 CERFONTAINE

UZU LA KUNMETITAN ĜIRILON

**BN: La "JARLIBRO" de UEA enhavas informojn kaj milojn da adresoj de UEA…**

**La "GVIDLIBRO" estas la "Jarlibro" sed sen la adresoj !**

"KONTAKTO" estas la revuo de la junulara sekcio de UEA : TEJO

**BN : Bonvolu nepre motivi vian ĝirilon per kodoj :**
**Ekzemple : MJ aŭ MA+Kto**